Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 28 novembro – 1 decembro

# La Flamo de Esperanto

30-a de novembro 2024, numero 4

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## GRAVE: Ŝanĝo de la dato de la 110-a UK en Brno: 26.7.-2.8.2025

UEA informas, ke pro neatenditaj cirkonstancoj la dato de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) devis esti ŝanĝita. La UK, antaŭe planita por 19-26 julio 2025, nun okazos la sekvan semajnon, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto 2025.

La ŝanĝo estis necesa por eviti koincidon kun alia pli granda evento en la regiono de Brno, kio kaŭzus nedisponeblecon de loĝlokoj kaj konsiderindan altigon de ties prezoj dum la kongresa periodo. UEA jam estas en rekta kontakto kun la ĝisnunaj aliĝintoj. Tiu ŝanĝo estas por la plej bona ĝuo de la kongresanoj kaj spegulas la diligentan laboron de la Kongresa Fako de UEA kaj de la Loka Kongresa Komitato (LKK). Ili sukcesis rapide certigi, ke la evento povos okazi laŭ la plej bonaj kondiĉoj por niaj gastoj laŭ la nova dato.

Pro tiu ŝanĝo la limdato de la unua plej favorpreza aliĝperiodo estis plilongigita ĝis la 15-a de decembro 2024. UEA invitas ĉiujn ankoraŭ nealiĝintajn profiti de la nova limdato, aliĝante ĉe https://uk.esperanto.net.

Nuntempe oni pretigas ĉiujn bezonatajn datumojn por la Dua Bulteno, kiu aperos ĝis fino de la jaro. En ĝi haveblos favorprezaj tranoktebloj, samkiel interesaj ekskursoj, inkluzive de la antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj.

La dato-ŝanĝo okazis kunlabore kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La 58-a ILEI-Kongreso, planata por okazi en Beogrado, Serbio, nun okazos la semajnon antaŭ la 110-a UK. La teamoj de la 110-a UK kaj de la 58-a ILEI-kongreso devos kunlabori ankaŭ por ebligi bustransportadon de kongresanoj rekte inter la du kongresejoj, de Beogrado ĝis Brno. Pliaj informoj pri la 58-a ILEI-kongreso, kiel la aliĝilo, aperos baldaŭ ĉe https://www.ilei.info.





# La patrino de Esperanto

★ Anna Striganova

Neatendite kortuŝa kaj homeca estis prelego pri Klara (Silbernik) Zamenhof preparita de Michela Lipari. Ne multas informo pri ŝia vivo, propravole ŝi ĉiam restis en ombro de sia genia edzo, sed aŭskulti pri ŝia vivo estis tre agrable, kiel agrablas ajna historio pri vera, profunda, tutviva amo.





Kiam ili renkontiĝis la unuan fojon, L.L. Zamenhof ankoraŭ eĉ ne portis tiom konatajn por ni okulvitrojn. Sed jam portis en sia koro belan ideon pri kreado de la internacia lingvo, pri kiu li tuj rakontis al Klara. Kaj ŝi ekamis ambaŭ, kaj lin, kaj la ideon. Patro de Klara komence ne volis fordoni filinon al malriĉa okul-kuracisto, sed ankaŭ li baldaŭ ekestimis la junulon.

Kaj ekde tiam ŝi subtenis la edzon ĝis horo de lia forpaso, kaj Esperanton – ĝis sia lasta horo. Ni ĉiuj scias, kiom malfacilis vivo de la Doktoro, kaj ĉiam ŝi estis apud li, akompanis lin ĉe transloĝiĝoj, naskis al li tri infanojn. Ŝi estis lia sekretario, ŝi katalogis liajn korespondaĵojn, sendis menditajn librojn, plezure akceptis esperantistojn en ilia domo.

Malgraŭ la severa aspekto de Klara, konata al ni dank' al fotoj, ĉiuj, kiuj konis ŝin, diras, ke ŝi estis tre bonkora, optimisma kaj tenere ŝatis la edzon. Kaj li tre bezonis tion, ĉar ne estis fortika, ofte malsanis, tro laciĝis, multe fumis… Akompanante lin, ŝi ankaŭ defendis lin de li mem, postulante, ke li almenaŭ iomete ripozu. Ŝi ĉiam trovis en si sufiĉe da optimismo por en malfacilaj tagoj subteni varme kaj edzon kaj gefilojn. Kaj estas nepre menciinda, ke ĉiam Ludoviko rilatis al ŝi kun granda dankemo, kaj estimo, insistis, ke ŝi akompanu lin dum la Unua Kongreso, kaj ke ĉiam ŝi estu apud li, ankaŭ en momentoj de gloro. Kaj ŝi estis.






Kiam li estis forpasanta, ŝi sidis apud li.

Komence ŝi opiniis sian vivon sen la edzo sencela, sed baldaŭ ŝi retrovis sin en daŭrigado de lia laboro. Ŝi partoprenis la kongresojn, preferante tamen resti en ombro, daŭre akceptis gastojn. Ŝi kunfondis la klubon "Konkordo" por disvastigi ne nur lingvon, sed ankaŭ ideojn de la edzo.

Ŝi silente forpasis antaŭ cent jaroj, en decembro de la 1924, kaj estis entombigita apud ŝia edzo. Tiam Esperanto perdis sian patrinon.

Sed ni, ĉe ŝia tombo ariĝante,
Promesu, ke per-age kaj -parole
Ni por la orfo penos plej bonvole,
Al venko kaj triumf' ĝin kondukante.

*(Teo Jung )*

* * *

Post la prelego sekvis inspirita de Arko (Gong Xiaofeng) diskutado pri virinoj en Esperanto-movado kaj aparte pri virinoj-pioniroj de ĝi.



# Orfejo Klara Zamenhof

Augustin Kakozwa kaj Betti Maul

Karaj samideanoj,

Kiel vi legis en  niaj informoj en diversaj informiloj, ni estas membroj de Asocio Nova Familio-Goma, kiu nun havas orfejon nomatan Orfejo Klara Zamenhof, eble iuj inter vi jam estas informita pri tio.




Dum la UK en Tanzio, kiun unu el niaj membroj Augustin Kakozwa partoprenis unuafoje, vi interesiĝis pri nia laboro ĉe la Movada Foiro, ni dankas vin pro viaj zorgoj kaj intereso. Kiel vi scias, ANF prizorgas orfajn infanojn kaj esperantigas ilin, ĉi tiu lernjare ni disdonis, dank' al via monhelpo, lernomaterialojn al tiuj infanoj, kiujn ni prizorgas. Koregan dankon al ĉiu donacinto!

Post disdono de la lernejaj ekipaĵoj ni daŭrigas serĉi monon por pagi la lernejajn kotizojn por tiuj infanoj subtenindaj. Ĉu vi ekhelpus tiucele laŭ viaj povoj?

Por monsendi vi povas uzi:

PayPal al *cifrank@t-online.de* kun rimarko „georfoj".


Ni kontakteblas ĉe: *orfojkongo@gmail.com*.

**Vi povas esti aŭtoro de *La Flamo de Esperanto*! Por kontribui, skribu al la redakcio**

**revuo.esperanto@gmail.com**

# Pri la Faka Forumo

**Okazis vendrede dum la VK, 17:00 UTC.**
**Kunordigis: A. Wandel**




La Faka Forumo – kunveno de Fakaj Asocioj (FA) de UEA, en kiu ĉiu FA havas kelkajn minutojn por raporti pri sia agado, okazis en la du antaŭaj jaroj hibride en Montrealo kaj Torino. Ĝi tamen ne okazis en Aruŝo, ĉar ne estis antaŭviditaj multaj surlokaj prezentantoj, kaj ne estis certeco pri fidinda retkonekto. Tial estis decidite okazigi la Fakan Forumon de 2024 dum la VK. Ĉar la invitoj al la FA estis senditaj lastmomente, anticipe aliĝis nur malpli ol dek prezentantoj, sed spontanee surloke estis reprezentitaj preskaŭ dudek fakaj grupoj, ne ĉiuj Fakaj Asocioj de UEA.

La planita daŭro de 45 min devis esti plilongigita je duonhoro. La reprezentitaj FA kaj aliaj profesiaj/scienca grupoj:

| | |
|---|---|
| IKUE | Katolikoj |
| KELI | Kristanoj Protest. |
| ATEO | Ateistoj |
| AVE | Verduloj |
| IAdEM | Matematikistoj |
| TEĴA | Ĵurnalistoj |
| SAT | Sennacia Asocio Tutmonda |
| EDE | Eŭropanoj |
| IKEF | Komercistoj |
| KAEST | Konf.Aplik.E.Sci.Tek. |
| BEL | Bahaanoj |
| VS | Verdaj Skoltoj |
| IFEF | Fervojistoj |
| Elf-Arek | Filatelistoj |
| Eŭrokka | Muzikistoj |
| ISAE | Sciencistoj |
| AIS | Akad. Int. Sciencoj |
| UEA | AKSO |

# Filipina Esperanto-Junularo

Jam dufoje okazis, kaj reokazos morgaŭ, la ViMF-prezento de Filipina Esperanto-Junularo (FEJ). Tio estas grupo de junuloj, ne multaj, sed aminde viglaj, aktivaj, komunikemaj. En la revuo *Esperanto* (n-ro 11, 2024) vi povas legi artikolon kaj vidi fotojn pri antaŭnelonge pasinta ilia renkontiĝo FAJRO.

La organizo aperis en la jaro 2013, antaŭ tio strukturita Esperanto-movado en Filipinoj ne ekzistis. En la jaro 2014 la organizo ricevis sian aktualan nomon.

Aktivaĵoj de la organizo estas sufiĉe multaj:




★ Monataj lingvaj renkontiĝoj: ĉiun sabaton de la monato filipinaj esperantistoj povas renkontiĝi por babili. La renkontiĝoj povas okazi kaj rete kaj ĉeeste. La ĉeestaj foje okazas forme de ekskursoj al interesaj lokoj de la ĉefurbo.




★ Filipina Junulara Renkontiĝo FAJRO: ĝi ekis ĉi-jare kaj devas iĝi ĉiujara. Ĝi celas unuigi esperantistojn de la tuta lando kadre de unu ĉeesta renkontiĝo. La ĉi-jara renkontiĝo havis 14 partoprenantojn, kaj tio estas la plej granda Esperanto-renkontiĝo en la historio de Filipinoj. FEI kore invitas vin partopreni sekvan FAJRO en la jaro 2025 por ke la renkontiĝo iĝu vere internacia. Ĝi okazos en Lian, Batangas, de la 15-a ĝis la 17-a de aŭgusto. Vi povas viziti aranĝon, dediĉitan al ĝi dum la VK:

**Ĉu vi volas esperantumi en Filipinoj en 2025?**
**Dimanĉo, la 1-a de decembro 2024**
**UTC 12:00 – 12:45**

★ Prelegoj en universitatoj (ekzemple en Universitato de Filipinoj kaj Filipina pedagogia universitato) kaj gimnazioj, publikaj seminarioj, enkondukaj lingvaj kursoj.

★ Renkontiĝoj pri specialaj okazaĵoj (Zamenhof-tago, naskiĝtago de la organizo ktp.), pli solenaj kaj pli bone preparitaj ol la ordinaraj.

★ Ĉiĉeronado por Esperanto-gastoj. Bedaŭrinde malmultaj eksterlandanoj vizitas la landon, sed vi estas ege bonvenaj!

★ Reprezentado ĉe internaciaj kaj landaj kongresoj malgraŭ multaj malfacilaĵoj.

★ Retaj kursoj. Ĉiun duan monaton estas okazigata la kurso "Esperanto: lingvo por konektiĝi kun la mondo", kiu estas senpaga.

★ Reklamado en la reto. Angle kaj filipine verkitaj reklamoj estas disvastigataj en la sociaj retoj.

**La organizaĵo atendas vian subtenon, helpemon kaj bonvenigas vin en Filipinoj.**

# Favora koincido

★ Mireille Grosjean

La burundaj esperantistoj povis esti en kontakto kun la ministrino pri solidareco kaj homaj rajtoj, Sinjorino Imelde Sabushimike. Ili prezentis Esperanton. Iom poste, en julio, mi kiel reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, havis la okazon renkonti la ministrinon en Svislando kaj paroli kun ŝi pri ??? Esperanto! Mi informis miajn amikojn en Burundo pri tiu renkontiĝo kaj tuj ili povis reiri al ŝia oficejo kaj konstatis ŝian pozitivan sintenon al nia lingvo. Do de du flankoj ŝi aŭdis pri Esperanto. Sekvo de tio estas, ke kurso okazos fine de decembro en Gitega, la nova ĉefurbo de Burundo, por instruistoj de tiu komunumo twa (pigmeoj), kiuj ofte suferas diskriminaciojn. Poste tiuj instruistoj povos plu instrui al siaj lernantoj. La akiro de nova internacia lingvo donos al ili avantaĝojn kaj prestiĝon. La ministrino anoncis sian partoprenon en diversaj momentoj de la kurso. Patrick Manirakiza raportis pri tiu kurso en la VK sabate je la 14-a horo. Li menciis la subtenon de Scio Sen Bariloj, ILEI kaj UEA

.

